

# KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ  
Jaro 43-a BRAZILO, JANUARO-FEBRUARO-MARTO 2019 N-ro 173

“Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”  
JESUO (Mt, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”  
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo.*  
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian.”  
ZAMENHOF. *La Espero.*

## KOMENCO, MEZO KAJ FINO

**T**io okazis en la komenco de l' Tempoj... La Sinjoro de l' Mondo ŝvebis super la Tero lumigita de la naskanta suno kaj disŝutis sur ties kampojn la unuajn semojn...

En la profundo de l' grundo, sub la suna varmego kaj la pluva mildeco, iom post iom, ili transversis siajn valorojn kaj tuj ekaperis la arbaroj, ornamente la kampojn per multformaj floroj kaj fruktoj.

Post tio, inter la verdaj folioj de l' fortikaj arboj, vidiĝis la unuaj nestoj de kantantaj birdoj, distingiĝaj per la diverseco de siaj kantoj; koloraj papilioj plibeligis la pejzaĝojn, kaj pluraj aliaj grupoj kuniĝis, sin rekonante laŭ la bruaj sonoj, kiantaj aŭ raŭkaj, per kiuj ili montriĝis.

Finfine, plenigante la Dian Kreadon, ekaperis la Homoj, kiuj, kvankam prezentis malsimilajn reagojn antaŭ la malfacilaĵoj postulataj de l' elvolviĝo de la rezono, jam sciis defendi la interesojn de ĉiu aparta grupo per propra kaj diversa lingvaĵo.

Longdaŭraj jarcentoj sinsekvis kaj la Tempo, markita de l' travivitaj spertoj, iom post iom fundamentis la konsistigajn valorojn de l' komunikado.

La Homo fariĝis konata per la vorto, skriba aŭ parola, per kiu komunikadis al la aliuloj siajn dezirojn kaj idealojn, siajn eltrovojn kaj konkerojn, siajn fiaskojn aŭ venkojn.

Sed... kiomfoje tiu Komunikado suferis la enmiksiĝon de neperfekta interpreto aŭ traduko, naskanta embarason kaj suspekton?

Komuniki estis nepre necese, tamen la vorto devus esprimi la veron! Kompatante, la Sinjoro de l' Vivo decidis helpi la Homon renkonti la plej facilan rimedon riveli sian penson, egale simpligante la Vorton – ĉefan fonton por kunligo inter la grupoj.

Tiamaniere, la Amo, la Paco kaj la Konsolo estus tradukitaj laŭ brila formo, ne bezonante interpreton kaj falante sur ĉies koron kiel la roso, pura kaj simpla, atingas la florojn, faciligante la elverŝiĝon de ties parfumo.

Pro tio, por ke plenumiĝu la Volo de l' Sinjoro, unu el liaj fidelaj servoj alvenis sur la Teron, prenante la nomon Ludoviko Zamenhof.

Kun la menso kaj la koro registrantaj la valorojn de perfekta Komunikado, sen la malutilo de l' interpretoj, Zamenhof dediĉis sian vivon al la plenumo de la prenita respondeco, kreante Esperanton – la lingvon de l' Espero! Espero vidi Pacan Mondon!

Espero spekti kompreniĝajn gestojn inter la Homoj, sen la malsamecoj de klaso, etno aŭ religio!

Espero kunvivi kun la “Aliulo” en Mondo buntigita per la koloroj de Reciproka respekto kaj Laboro de l' Bono.

Espero vivi en Mondo, kie Komunikado realiĝu sen superfluaĵoj. Finfine, en Mondo, en kies plej humilaj anguloj estu disvastigata la Dia Vorto, kiu, iutage, fariĝis aŭdebla por la kore simplaj: “Vi amu unu la alian”!

Benataj estu la manoj, kiuj laboras oferante la paĝojn de ALMANAKO LORENZ! Por ili – la laboristoj de l' Oficejo de la Espero, ni petegas la benojn de l' Fido, por ke ili daŭrigu prezentante al la moderna Homo la inviton kunlabori en la realigo de dia revo: la transformado de l' Homaro en unu solan Gregon, sub la ama kondukado de unu sola Paŝtisto!

Esperantigis: Leonardo Lara Ribeiro



Brunilde Mendes do Espírito Santo  
– Brazilo –





Anatoli Ionesov, delegito de UEA en Samarkando, Uzbekio, estas unu el la plej aktivaj esperantistoj, vera propagandisto de Esperanto! Li estas fondinto de la internacia Muzeo por Paco kaj Solidaro, en Samarkando. Ĉi tiu muzeo ricevis la honoran titolon "popola muzeo" de la uzbeka ministro pri kulturo. Anatoli estas konstanta kunlaboranto de Almanako Lorenz, kies kronikoj tre agrablas al la legantaro de nia revuo en la tuta mondo. Daŭrigu vian belan laboron por la paco tersurface, kara frato kaj samideano Anatoli!



**KUNLABORU!** – Membrigu ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

**COLABORE!** – Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!

## LORENZ

### “KOMUNIKOJ”

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ  
Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 43-a – n-ro 173 | Januaro-Februaro-Marto 2019

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj  
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

### KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz  
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal  
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)  
Telefonoj: ☎ + 55-21-2221-2269 - ☎ + 55-21-2450-4768  
Skajpo: [Lorenz Editora](mailto:Editora Lorenz) | Fejsbuko: [Editora Lorenz](https://www.facebook.com/Editora Lorenz) | Retadreso: [editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)  
Retpaĝo: <http://editoralorenz.blogspot.com.br>

### SENDUBE

Tempesto timigas. Tamen ĝi plifortigos nian rezistemon, se ni scios ĝin ricevi.

\* \* \*

Doloro disŝiras. Tamen ĝi plibonigos nian koron, se ni penos preni el ĝi profiton.

\* \* \*

Luktado konsternas. Tamen ĝi havigas al ni nekalkuleblajn bonaĵojn, se ni akceptas ĝian helpon.

\* \* \*

Nekomprene doloras. Tamen ĝi donas al ni bonegan okazon kompreni.

\* \* \*

Malespero detruas. Tamen en ĝi ni trovas okazon tenadi trankvilecon.

\* \* \*

Malamo nigrigas. Tamen ĝi senvualigas benatan horizonton por la elmontriĝo de amo.

\* \* \*

Aflikto frakasas. Tamen ĝi malfermas pordojn por konsola ago.

\* \* \*

Morala ekbato konsternas. Tamen el ĝi ni ĉerpas benindan renoviĝon.

\* \* \*

Elprovado torturas. Tamen sen ĝi lernado ne estas ebla.

\* \* \*

Malhelpaĵo ĉagrenas. Tamen ĝi estas efektiva faktoro de altigo kaj kapabligo.



Kompostita de Rogério Mota



## Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof

Al Majnov\*, I.XI.1889


Multestimata Vladimir Vladimiroviĉ! - Mi rapidas komuniki al vi, kiel al la protektanto de la esperanta lingvo, ke dum la forestado de d-ro Zamenhof el Varŝava (forveturinta por kelka tempo al sudo de Rusujo) en la ĉi tiea Cenzura Komitato estas ricevataj 300 ekz. de N<sup>o</sup> 2-a de la ĵurnalo "La Esperantisto", kiuj, laŭ instigo de malfavoranto al la lingvo, estas ekspeditaj poŝte al S.-Peterburg en la komitaton de alilanda cenzuro por trarigardo kaj rezolucio.

Se por vi la intereso de la lingvo Esperanto estas kara, en kio cetere mi neniam dubas, tiam ne rifuzu, pro Dio, klopodi tie en la komitato de alilanda cenzuro, por ke N<sup>o</sup> 2-a estu permesita, ĉar N<sup>o</sup> 1 estis jam permesita de la ĉi tiea cenzuro kaj ĉar en tiu ĉi sama lingvo ja estis jam presitaj kun permeso de la cenzuro 32 diversspecaj verkoj.

Por d-ro Zamenhof. (Sen subskribo.)

\* La letero, skribita per virina skribkaraktero en la rusa lingvo, estas skribita plej verŝajne de la edzino de d-ro Zamenhof. (tradukita esperanten de N. V. Nekrasov.)

(Fonto: Iom Reviziita **Plena Verkaro** de L. L. Zamenhof. Originalaro 1. Unua etapo de Esperanto – 1878-1895. Eldonejo Ludovikito, 1989.)



Karaj geamikoj  
el la tuta mondo, se vi  
volos ricevi, senpage,  
pere de Interreto,  
pdf-ajn versiojn  
de ALMANAKOJ LORENZ,  
sciigu al ni vian retadreson  
kaj kun granda ĝojo  
ni ilin sendos al vi:

[editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)

## La Pensoj Estas Fortoj

Abel Gomes

La pensoj, eĉ sen vortoj  
Tre grandaj estas fortoj,  
Kaj povas bonon krei  
Aŭ al malbon' obei.

Se iu pensas ŝteli,  
Mortigi aŭ ribeli,  
Spirite li jam faras  
Ja kion li preparas.

Se pensas li pri krimo  
Li iĝas tuj viktimo  
De krima la ideo,  
Gvidante al perejo.

Nu, pensu ĉiam bonon,  
- mi donas ĉi-admonon, -  
Pensadu pri la sano  
Kaj pac', kaj ne pri vano!

Ne pensu pri milito  
Nek pri mirakla mito,  
Nek pri malsan', danĝero:  
Protekto vin l' espero.

(Fonto: Reformador, Feb. 1946, p. 30)

## Os Pensamentos São Forças

Mesmo sem palavras, os pensamentos são grandes forças que podem criar o bem ou obedecer ao mal.

Se alguém pensa em furtar, assassinar ou revoltar-se, em espírito já está fazendo, na verdade, tudo que está planejando.

Se pensa no crime, torna-se logo vítima da ideia criminosa que o leva à ruína.

Advirto-te, pois, que penses sempre no bem, na saúde, na paz, e nunca em coisas más!

Não penses na guerra, nem num mito milagroso, nem na doença, nem no perigo, e a esperança te protegerá.

Kunlaboris: Aymoré Vaz Pinto

## JES!... MI SESDEKNAŬIS!

(Oficiala parolo al la mondo)

Eĉ mi mem tion ebla ne kredis.  
Sed tia estis ekzistiga determino.  
Kun multa ĝojo mi sukcesis.  
69, 69, 69. Vivu! Vivu!

La samon deziras mi al ĉiuj:  
ĉu amikoj, ĉu malamikoj,  
ĉu konatoj aŭ nekonatoj.

Estas gravsignife en niaj vivoj  
atingi tiun tiom kontentigan aĝon  
Multaj salutoj ricevitaj,  
Multaj dankesprimoj disdonitaj.  
69 jaroj da batalado,  
suferoj, venkoj, persvado,  
69 jaroj da laboro kaj fido.

Restas nur la ĝendemandado:  
Kaj nun? Ĉu mi naŭdeksekos?

Oni celebru la vivon, la plenvivon,  
Serĉante spiritan evoluon,  
Serĉante servi, kunlabori,  
Serĉante transdoni, kundividi,  
Serĉante pardoni kaj sin superi...

## É!... EU FIZ SESSENTA E NOVE!

(Pronunciamento à Nação)

Célio Freitas Martins (Brazilo)

É... Nem eu mesmo acreditava  
que seria possível. Mas foi.  
Com muita alegria, consegui.  
69, 69, 69. Hurra!!!

O mesmo eu desejo para todos:  
amigos ou inimigos,  
conhecidos ou desconhecidos.

É relevante em nossas vidas  
atingir essa idade tão gratificante.  
Muitos cumprimentos,  
Muitos agradecimentos.  
69 anos de luta, sofrimentos e vitórias.  
69 anos de perseverança e progresso  
69 anos de trabalho e muita fé.

Só resta a grande pergunta:  
E agora? Chegarei aos 96?

Celebração à vida em plenitude,  
Buscando o crescimento espiritual,  
Buscando servir, cooperar,  
Buscando transmitir, compartilhar,  
Buscando perdoar e superar...



L aŭ la antikva ĉina proverbo: donacante libron, oni donacas animon. Ĉiu libro enhavas unikajn ideojn, vortojn, frazojn... kiuj kapablas transformi pensmanieron de leganto, riĉigi lian sperton kaj eble influi lian vivon. Ricevante librojn de Asocio Lorenz, mi plurfoje ricevadis “novajn animojn”, kiuj inspiradis min, vekis mian intereson pri universalaj kulturaj valoroj. Mi eĉ povus diri, ke la libroj multe influis mian spiritan maturiĝon, kio permesis al mi dividi la trovitajn en ili trezorojn kun geamikoj, gelernantoj kaj legantoj de **“Almanako Lorenz”**. Estis, estas kaj espereble estos por mi honoro kunlaboradi en la nobla verko de la Asocio. Okaze de la Jubileo, mi esprimas mian dankon pro ĉio kaj deziras al ĝia estraro kaj membroj, fruktodonan kontakton kun libroj - ĉu kiel eldonantoj, ĉu kiel legantoj, ĉar mi estas certa, ke iel ajn funkcios la mirinda, unika interŝanĝo de animoj danke al la eldona kaj populariga agado inspirita de la nobla spirito Francisco Valdomiro Lorenz.

# BIOGRAFIETO DE KRUGER MATTOS GRAVA ESPERANTISTO KAJ SPIRITISTO

Robinson Mattos

**M**ia patro, Kruger Mattos, estis fervora spiritisto, esperantisto kaj framasono. Li naskiĝis la 22an de februaro 1900, en la urbeto Carangola, ŝtato Minas Gerais. Liaj gepatroj estis Horácio de Mattos (filo de Silvério de Matos kaj Maria Cândida de Souza) kaj Vitalina Mattos (filino de José Bento de Carvalho kaj Joana Bento de Carvalho).

Lia patra avo ricevis la nomon Silvério danke al la sugesto de la praavo de Kruger, sinjoro Allão Mattos, elkarniĝinta, kiu mediume kaj spontanee manifestiĝis tiurilate.

En la aĝo de 13 jaroj, la patrino de Kruger edziniĝis. Kiam ŝi naskis Kruger-n, ŝi estis adoleskantino – preskaŭ 14jara. La akuŝo okazis je la dek-dua horo, nokte.

La gepatroj kaj la geavoj de Kruger havis multnombrian familion.

Kruger, la plejaĝa filo, faris elementan kurson ĉe Gimnazio “Carangolense”. Poste li diplomiĝis pri Komercaj Sciencoj ĉe Instituto Comercial Mineiro, lernejo fondita de Machado Sobrinho. Tiam la Instituto distingis lin per la titolo “knabo el arĝento”.

Kiam li estis 17 jaraĝa, li eniĝis la Brazilan Armeon kiel volontulo, por partopreni en la Unua Mondmilito, sed li restis en Brazilo. Do, li ne batalis. Li sin dediĉis al la armea ofico kun granda zorgo kaj pro tio li ricevis laŭdojn de gravaj aŭtoritatoj, kiel de Wenceslau Braz Pereira, prezidento de la Respubliko, de Ministro de la Milito (generalo de divizio) kaj de la komandanto de la 3-a Infanteria Regimento, kolonelo Mena Barreto, kiu poste iĝis generalo.

En 1922, Kruger oficis je la popolregistrado, kiel speciala delegito en la urbo São Manoel do Mutum.

En la aĝo de 13 jaroj, Kruger komencis verki poemojn. Li kontribuis al diversaj brazilaj gazetoj per poemoj kaj prozaĵoj.

Kruger diplomiĝis en la Jura Fakultato de Niterói. Dum pli ol 30 jaroj, li estis sekretario ĉe la Urbodomo de Carangola.

Li edziĝis al Amália Mattos kaj ili havis 15 gefilojn, 12 el ili jam elkarniĝis. Ankoraŭ restas en la enkorpa ekzistado Robinson Mattos, Winston Mattos kaj Krugerson Mattos.

Kruger kunfondis la institucion “Cenáculo de Estudos Evangélicos e Núcleo Esperantista Ismael Gomes Braga”, kie li prelegadis pri spiritismaj kaj evangeliaj temoj dum dekoj da jaroj. Varbita de Ismael Gomes Braga, Kruger fariĝis tre agema esperantisto.

Li estis membro de la Beletra Akademio de Juiz de Fora kaj verkis la jenajn librojn: “Irmãos de Jesus”, kiu estis eldonita de Brazila Spiritisma Federacio (unua eldono



en 1945); “Estudos bíblicos”; “Espiritismo antítese do cristianismo?”; “Juvenília” (versoj); “Templo e não mercado”; “Epístola evangélica”; “Evangelhos em harmonia”; “Retalhos d’alma”; kaj “Meu filho” (poemoj).

La verko “Juvenília” estis eldonita de Societo Lorenz, kaj centoj da ekzempleroj estis donacitaj al familianoj kaj al konatuloj. Tiu verko estas aĉetebla ĉe Eldonejo Lorenz.

La libro “Meu filho” (Mia filo) temas pri poemoj, en kiuj Kruger bedaŭras la morton de sia naŭjara filo, Simpson Mattos.

Per la mediumeco de Dilma Montenegro, ĉe “Sociedade Espírita Evangelizadora”, en Rio de Janeiro, Kruger skribis la mesaĝon titolitan “A luz da estrela” (La lumo de la stelo). Jen ĝi:

“Karaj kunuloj de idealo, fratoj en la Kristo,  
Ĉi tie ni estas – malsamaj regionoj, materia kaj spirita –  
entenataj en ununura koro, en ununura penso: la frateco,  
la kunvivo je amo, kiu troviĝas en Esperanto.



(Daŭrigo de la artikolo pri Kruger Mattos)

Granda estas la feliĉo, kiun mi kunportas pro tio, ke ni estas kune en tiuj momentoj je kunfratiĝo! Kiel batas mia koro, vidante vin kunsidantaj por la sama idealo!

Al vi mi ofertas spiritajn florojn, pacon kaj kuraĝon por via glora vojirado. La ĉiutaga penado estas granda, sed mi scias, ke vi ne fiaskos. Dum la vojirado, gvidos vin la lumo de la Stelo. Dio benos vin por la semado favore al Esperanto. Ĉi tie ni daŭrigas la aktivadon por nia komuna idealo.”

Tiu fervora spiritisto, amiko kaj disĉiplo de Ismael Gomes Braga, estas bonkora homo, modelo de virtoj, simpla, modesta kaj laborema. Li konkeris la estimon de samurbanoj pro sia neriproĉebla konduto. Por omaĝi lin, ekzistas en la urbo Carangola la strato Kruger Mattos.

Fine mi prezentas la poemon “Missionário” (Misiisto), verkitan de sinjorino Diva Mattos Allão, fratino de Kruger, esperantigita de Benedicto Silva.

## Misiisto

Al la frato Kruger Mattos

El Sinaj´ al ni diktis la leĝojn por homaro  
Same kiel Moseo, l´eterna senmortulo,  
Kaj meze de la fajro nin dotis per regulo,  
Por ni reveno via fariĝis sama raro.

Ankaŭ vi originis el vilaĝa angulo,  
Kaj plie vin ĉagrenis miskompren´ de l´ frataro:  
Ĉiam okuloj viaj celas al la Lazuro;  
Ĉar la Mastron Moseo vi egalas en ĉio!  
Se temas pri Jesuo, graviĝas via faro.


Vian gravan mision neniu kontraŭstaras,  
Via parolo vipas l´ amason, kiu baras.  
Se vi pentras Ĉielon kaj la Juston de Dio,  
Tutcerte vi atingos la Landon Promesitan,  
Donantan Bonon, Pacon kaj Vivon Verdiritan.

Diva



## SENPAĜAJ LIBROJ...

Ĉiuj kiuj loĝas ekster Brazilo  
rajtas ricevi niajn librojn,  
en Esperanto, tute senpage.  
Sufiĉas nur sendi vian kompletan  
nomon kaj poŝtadreson al  
[editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)



LORENZ